


D-ro Esperanto  
(L.Zamenhof)

# **Lingvo internacia** («Unua libro»)

Hajfo  
2014

Elrusigis: A.Kerbel.



Д-р ЭСПЕРАНТО.  
D-ro ESPERANTO.

**МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫК.**  
LINGVO INTERNACIA.

ПРЕДИСЛОВИЕ ANTAŬPAROLO  
и kaj  
**ПОЛНЫЙ УЧЕБНИК.**  
PLENA LERNILO.  
**por rusoj**

чтобы язык был всемирным, не  
достаточно назвать его  
такowym.  
por ke lingvo estu internacia ne  
sufiĉas nomi ĝin tia.

Цена 15 копеек  
Prezo 15 kopekoj

## ВАРШАВА VARSOVIO

Типо-Литография Х. Кельтера, ул. Новолинье N° 11.

Tipo-Litografio de Ĥ. Kelter. str Novoline N° 11.

**1887**

De la tradukinto:

La tradukaĵo ne pretendas, certe, esti parto de la Fundamento. Sed, de alia flanko, tiu ĉi unua priesperanta verkaĵo de Zamenhof, kiu konatigis «legantan mondon» kun projekto de **Lingvo internacia**, estas grava historia dokumento, prezentanta, interalie, prilingvajn intencojn de la aŭtoro. Ankaŭ nun, tradukita en aliajn lingvojn, la verko povas esti sufiĉe utila poresperanta propagandaĵo. Do tre gravas ke esperantistaro konu sian **Unuan libron**.

«Rajto traduki tiun ĉi broŝuron je ĉiujn aliajn lingvojn estas prezentata al ĉiu.»

# Lingvo internacia

D-ro Esperanto (L. Zamenhof 1859 – 1917)

## Antaŭparolo

Eblas ke la proponatan broŝuron leganto prenos nekonfide, kun antaŭjuĝa penso ke estos proponata al li iu neefektivebla utopiaĵo. Tial, antaŭ ĉio, mi devas peti la leganton demeti tiun ĉi antaŭjuĝan penson, kaj ekrilati la proponatan aferon serioze kaj kritike.

Mi ne parolados ĉi tie pri tio kiun grandegan signifon por homaro havus enkonduko de unu, per

ĉiuj agnoskita internacia lingvo, kiu estus samrajta havaĵo de tuta mondo, ne apartenante al iu el ekzistantaj popoloj.

Kiom da tempo kaj penoj kostas ellerno da malpropraj lingvoj, sed, malgraŭ tio, elveturinte la patrolandon ni, kutime, ne kapablas konversacii kun homoj samaj al ni.

Kiom da tempo, penoj, kaj materiaj rimedoj estas elspezataj por verkojn de unu literaturo alproprigi al ĉiuj aliaj literaturoj. Sed, malgraŭ tio, ĉiu el ni povas konatiĝi, per tradukaĵoj, nur kun plej sen-signifa parto da malpropraj literaturoj.

Sed, se ekzistus internacia lingvo, tiam ĉiuj tradukoj estus farataj nur en tiun ĉi lastan, estiel neŭtralan, al ĉiuj kompreneblan. Kaj verkojn internaciecajn oni kreus, eble, senpere per ĝi. Falus ĉinaj muroj inter homaj literaturoj; literaturaj verkoj de aliaj popoloj iĝus por ni same atingeblaj kiel verkoj de nia propra popolo; literaturo ekestus komuna por ĉiuj homoj kaj, kune kun ĝi, ankaŭ eduko, idealoj, konvinkoj, streboj, – kaj popoloj interproksimiĝus en unu familion.

Devigitaj dividi nian tempon inter diversaj lingvoj ni kapablas fordoni nin, kiel decus, al neniu el ili. Tial, de unu flanko, malmultaj el ni regas perfekte eĉ propran lingvon; kaj, de alia flanko, la lingvoj mem ne povas perfektigi. Tial, parolante la gepatran lingvon, ni ofte devas pruntepreni vortojn kaj esprimojn de aliaj popoloj, esprimiĝi malprecize, kaj eĉ pensi malgracie pro mankoj de la ling-

vo. Alia afero estus se ĉiu el ni havus nur du lingvojn. Tiam ni pli bone posedus ilin, kaj la lingvoj mem povus pli bone perfektigi, riĉigi, kaj starus multe pli alte ol ĉiu el ili staras nun. Lingvo estas ja ĉefa motoro de civilizacio: dank al ĝi ni tiel superis alimalojn, kaj ju pli perfektas la lingvo, des pli rapide progresas la popolo.

Diverseco de lingvoj estas esenco de diverseco kaj malamikeco inter nacioj, ĉar jen kio tuj rimarkindas dum interrenkonto de homoj: ili ne komprenas unu alian, kaj tial fremdiĝas unu de alia. Renkontante homojn ni ne demandas ilin pri iliaj politikaj konvinkoj, en kiu parto de terglobo ili naskiĝis, kie loĝis antaŭ kelkaj miljaroj iliaj antaŭuloj; sed tiuj homoj ekas paroli, kaj ĉiu sono de ilia parolo memorigas al ni ke ili estas fremdaj al ni. Kiu eĉ unufoje spertis loĝi en urbo, loĝata per homoj de diversaj, luktantaj inter si nacioj, tiu sendube eksentis kiun grandegan servon okazus al homaro lingvo internacia kiu, *ne invadante hejman vivon de popoloj*, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo ŝtata kaj komunuma.

Kiun, fine, grandegan signifon havus internacia lingvo por scienco, komerco, – do ĉiupaŝe, – pri tio, mi opinias, ne estas bezonate paroladi. Kiu eĉ foje pensis serioze pri tiu ĉi problemo, tiu konsentos ke neniu ofero estus tro granda, se pere de ĝi ni povus akiri al si komun-homaran lingvon. Tial ĉiu, eĉ plej malforta peno en tiun ĉi direkton valo-

ras nian atenton.

Al afero, kiun mi proponas nun al leganta publiko, mi dediĉis plej bonajn miajn jarojn; mi esperas do ke ankaŭ la leganto, pro graveco de la afero, volonte dediĉos al ĝi iom da toleremo, kaj atente tralegos ĝisfine la proponatan broŝuron.

Mi ne analizos ĉi tie diversajn provojn krei internacian lingvon. Atenton de la leganto mi turnas nur al tio, ke ĉiuj tiuj ĉi provoj aŭ prezentis sistemon da signoj por konciza laŭbezona interkompreniĝo, aŭ limigis sin per plej natura simpligo de la gramatiko, kaj anstataŭigo de vortoj, ekzistantaj en lingvoj, per aliaj, arbitre elpensitaj. Provoj de la unua kategorio estis ĝis tiom komplikaj kaj nepraktikaj, ke ili mortis tuj post sia naskiĝo. Provoj de la dua kategorio estis, kvankam, *lingvoj*, sed *internacia* en ili estis tute *nenio*. Aŭtoroj de la lingvoj ial nomis ilin "tutmondaj", eble pro tio ke en tuta mondo estis eĉ ne unu persono kun kiu oni povus interkompreniĝi pere de ili. Se por tutmondeco de lingvo sufiĉas ke unu persono nomu ĝin tia, tiam ĉiu el ekzistantaj lingvoj povas ekesti tutmonda laŭ deziro de iu ajn aparta persono. Tiuj ĉi provoj renkontis plenan fiaskon, ĉar ili naive baziĝis sur tio ke mondo ĝojos al ili, kaj sankcios ilin unuanime, kvankam ĝuste tiu ĉi unuanima konsento estas plej nebla parto de la afero, pro natura indiferenteco de mondo al kabinetaj provoj, kiuj ne alportas al ĝi senkondiĉan utilon, sed kalkulas je

preteco de mondo pionire oferi sian tempon.

Jes, plej granda parto de mondo tute ne interesiĝis pri tiuj provoj, kaj tiuj kiuj interesiĝis opiniis ke ne valoras perdi la tempon por ellerni lingvon pere de kiu oni povas interkompreniĝi kun neniu krom la aŭtoro. «Komence la mondo, aŭ kelkmilionoj da personoj ellernu la lingvon», – pensas la homoj – «tiam ankaŭ mi ellernos ĝin». Kaj la afero, kiu povus esti utilia al ĉiu aparta adepto nur se jam ekzistus amaso da ili, trovis neniun subtenanton, kaj okazis mortnaskita. Kaj se unu el lastaj provoj, "Volapuko", akiris, onidire, iom da adeptoj, tio okazis nur pro tio ke ideo mem de "tutmonda" lingvo estas ĝis tiom nobla kaj alloga, ke homoj kapablaj allogiĝi kaj destini sin al pionirado, oferas sian tempon en espero ke la afero **eble** sukcesos. Sed kvanto da allogemuloj venos ĝis certa nombro kaj haltos (oni ne identigu, certe, kvanton da venditaj libroj kun kvanto da adeptoj, ellernintaj la lingvon). Kaj malvarma indiferenta mondo ne volos oferi sian tempon por scipovi konversacii kun tiuj ĉi nemultaj. Sekve tiu ĉi lingvo, same al ĝiaj antaŭuloj, mortos, alportinte tute neniun utilon.

Problemo de tutmonda lingvo okupis min de longe, sed sentante min nek pli kapabla, nek pli energia ol aŭtoroj de ĉiuj senfrukte pereintaj provoj, mi longan tempon limigis min nur per revoj, kaj nevolaj meditoj pri la afero. Sed kelkaj feliĉaj pensoj, kiuj estis frukto de tiuj ĉi nevolaj

meditoj, kuraĝigis min al daŭrigo de la laboro, kaj instigis min provi, ĉu ne sukcesos mi sistemece superi ĉiujn barojn al kreo kaj ekuzado de racia universala lingvo. Ŝajnas al mi ke la afero pli malpli sukcesis, kaj nun mi proponas frukton de tiuj ĉi daŭraj kaj persistaj laboroj al pridiskuto de leganta mondo.

Plej gravaj taskoj, kiujn estis necese solvi, estis sekvaj:

**1.** Ke la lingvo estu ĝis tiom facila, ke oni povu ellerni ĝin ludante.

**2.** Ke ĉiu, ellerninta tiun ĉi lingvon, povu tuj ekuzi ĝin por interkompreniĝo kun personoj de diversaj nacioj, sendepende de tio ĉu estas la lingvo agnoskita per mondo, kaj ĉu trovos li multajn adeptojn aŭ ne. T.e. ke la lingvo de la komenco mem, dank al sia strukturo, povu esti efektiva rimedo por internaciaj rilatoj.

**3.** Trovi rimedojn por superi indiferentecon de la mondo, kaj instigi ĝin kiel eble rapide kaj amase komenci uzadon de la proponata lingvo estiel lingvon vivan, sed ne kun ŝlosilo en la mano, kaj en okazoj de ekstrema bezono.

El ĉiuj projektoj, kiuj en diversaj tempoj estis proponataj al publiko, ofte sub laŭta, neniel pravigita nomo "tutmonda lingvo", neniu solvis pli



ol **unu** el la menciitaj problemoj, kaj ankaŭ tiun nur **parte**. (Krom tiuj ĉi menciitaj tri ĉefaj problemoj estis bezonate solvi ankaŭ multajn aliajn, sed pri ili, ĉar ne esencaj, mi ne parolados ĉi tie).

Antaŭ ol transiri al prezento de tio kiel mi solvis la menciitajn taskojn, mi devas peti la leganton halteti kaj pripensi signifon de ili, sed ne rilati tro facile al miaj solvoj nur pro tio ke ili ŝajnos, eble, tro simplaj. Mi petas tion ĉar konas inklinon de plimulto da homoj rilati al la afero des pli pietate, ju pli komplika, grandvoluma kaj malfacile digestebla estas la afero. Tiaj personoj, ekvidinte la etan lernilon kun plej simplaj, al ĉiu kompreneblaj reguloj, povas ekrilati al la afero iom malestime, kvankam ĝuste atingo de tiu ĉi simpla kaj lakoneco, venigo de la afero el komplika formo, de kiu ĝi devenas, al plej simpla – konsistigis plej malfacilan parton de la laboro.

## 1

La unuan problemon mi solvis tiel:

**a)** Mi simpligis ĝis nekredebleco la gramatikon en stilo de ekzistantaj vivaj lingvoj, por ke ĝi povu esti simple asimilita, tamen neniom senigante la lingvon de klareco, precizeco kaj fleksebleco. *Tutan gramatikon de mia lingvo oni povas perfekte ellerni dum **unu horo***. Grandegan facilecon, kiun la lingvo ricevas de tia gramatiko, estas klara al ĉiu.

**b)** Mi kreis regulojn por *vort-kreado*, kaj per tio

atingis egan ekonomion en kvanto da lernendaj vortoj, ne nur evitante malriĉigon de la lingvo, sed, inverŝe, farante ĝin pli riĉa ol plej riĉaj vivaj lingvoj, dank al ebleco el unu vorto krei multajn aliajn vortojn, esprimante diversajn nuancojn de ideoj. Tion mi atingis per enigo de diversaj prefiksoj kaj sufiksoj, pere de kiuj ĉiu povas el unu vorto krei diversajn aliajn vortojn sen bezono lerni ilin. (Tiu prefiksoj kaj sufiksoj, por oportuneco, estas traktataj estiel memstaraj envortaraj vortoj).

Ekzemple:

**1)** Prefikso **mal**<sup>1</sup> signifas inverson de la vorto; do, konante vorton **добрый** (**bon'a**), ni jam mem povas krei vorton **злой** (**mal'bon'a**), tial ekzisto de aparta vorto por **злой** okazas jam superflua; **alt'a** **высокий** – **mal'alt'a** **низкий**; **estim'i** **уважать** – **mal'estim'i** **презирать** k.t.p. Sekve, lerninte nur unu vorton **mal**, ni iĝas jam liberigitaj de parkerigo de grandega vico da vortoj kiel, ekzemple,

**твёрдый** – **mal'mol'a** (konante **мягкий** **mol'a**),  
**холодный** (**mal'varm'a**),  
**старый** (**mal'nov'a**),  
**грязный** (**mal'pur'a**),  
**далёкий** (**mal'proksim'a**),  
**бедный** (**mal'riĉ'a**),  
**мрак** (**mal'lum'o**),

---

**1.** La **verda** koloro indikas esperanto-tekston ene de la (ruslingva) originalo. La **ruĝa** koloro substrekas ke temas pri rusaĵoj. (De la tradukinto).

позор (mal'honor'o),  
внизу (mal'alt'e),  
ненавидеть (mal'am'i),  
проклинать (mal'ben'i) k.t.p. k.t.p.

**2)** Sufikso **in** signifas inan genron; sekve, konante брат (frat'o) ni jam memstare povas krei vortojn сестра (frat'in'o); отец patr'o – мать patr'in'o.

Sekve superfluas jam vortoj

бабушка (av'in'o),  
дочь (fil'in'o),  
невеста (fianĉ'in'o),  
девочка (knab'in'o),  
курица (kok'in'o),  
корова (bov'in'o) k.t.p.

**3)** Sufikso **il** – instrumento por konkreta ago.  
Ekz. tranĉ'i резать – tranĉ'il'o нож;

sekve superfluas:

гребень (komb'il'o),  
топор (hak'il'o),  
колокол (sonor'il'o),  
плуг (plug'il'o),  
коньки (glit'il'o'j) k.t.p.

**4)** Kaj aliaj afiksoj (ĉirkaŭ 50).

Krom tio mi prenis komunan regulon ke ĉiuj vortoj, jam sukcesintaj ekesti internaciaj (t.e. tiel nomataj "alilandaj vortoj") restas en la internacia lingvo senŝanĝaj, akceptinte nur internacian ortografion. Ĉi-maniere ega kvanto da vortoj iĝas superflua por parkerigo;

tio estas, ekzemple,

локомотив, (lokomotiv'o),

редакция (redakci'o),

телеграф (telegraf'o),

нерв (nerv'o),

температура (temperatur'o),

центр (centr'o),

форма (form'o),

публика (publik'o),

платина (platen'o),

ботаника (botanik'o),

фигура (figur'o),

вагон (vagon'o),

комедия (komedi'o),

эксплуатировать (ekspluat'i),

адвокат (advokat'o),

доктор (doktor'o),

театр (teatr'o) k.t.p. k.t.p.

Dank al la menciitaj reguloj kaj al ankoraŭ kelkaj flankoj de la lingvo, pri kiuj mi trovas superflua paroladi ĉi tie, la lingvo iĝas ekstreme facila, kaj tuta laboro por ĝia ellerno estas limigita per

parkerigo de ĉirkaŭ 900 vortoj, (kiuj inkluzivas ĉiujn gramatikajn finaĵojn, prefiksojn kaj enfiksojn), el kiuj oni, uzante la regulojn kaj sen iuj specifaj kapabloj kaj streĉo de la cerbo, povas krei ĉiujn vortojn, esprimojn kaj parolmanierojn, bezonatajn en ĉiutaga vivo. (Cetere ankaŭ tiuj ĉi 900 vortoj, kiel vi vidos poste, estas elektitaj tiel, ke ellerno de ili, por pli-malpli klera persono, estas ekstreme facila).

Ellerno de tiu ĉi belsona, riĉa kaj komprenebla por tuta mondo lingvo (kialojn vidu sube) postulas do ne vicon da jaroj, kiel ĉe aliaj lingvoj, – por ellerno de ĝi tute sufiĉas kelkaj **tagoj**<sup>2</sup>.

## 2

La duan problemon mi solvis tiel:

**a)** Mi enkondukis plenan *dismembrigon* de vortoj je memstaraj vortoj, tial la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole el *neŝanĝeblaj* vortoj. Se vi prenos verkon, kreitan en mia lingvo, vi trovos ke ĉiu vorto tie *ĉiam* troviĝas en unu konstanta formo – en tiu ĝuste, en kiu ĝi troviĝas en la vortaro. Kaj diversaj gramatikaj formoj, rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per kunmetado de la neŝanĝeblaj vortoj.

Sed ĉar tia strukturo de lingvo estas tute neku-

---

**2.** Pri tio povas konvinkiĝi ĉiu, ĉar tiu ĉi broŝuro enhavas plenan lernilon.

tima al eŭropaj popoloj, kaj al ili estus malfacile kutimiĝi al ĝi, mi plene adaptis tiun ĉi dismembriĝon de vortoj al *stilo* de eŭropaj lingvoj; tial tiu kiu lernas mian lingvon per la lernilo, ne leginte antaŭe tiun ĉi antaŭparolon (kiu estas tute ne bezonata al lernanto), tiu eĉ ne konjektos ke strukturo de tiu ĉi lingvo diferencas per io de strukturo de lia gepatra lingvo.

Devenon de vorto **frat'in'o** (**сестра**), ekzemple, kiu fakte konsistas el tri vortoj:

**frat** (**брат**), + **in** (**женщина, самка**), + **o** (**то что есть, существует**)

la lernilo klarigas tiel:

**брат** = **frat**; sed ĉar ĉiu substantivo nominativ-kaza finiĝas per **o**, sekve **frat'o**.

Por krei inan genron de sama kazo, eniĝas vorto **in**; do **сестра** = **frat'in'o**. La streketoj (') estas metataj ĉar la gramatiko postulas meti ilin inter apartaj vortoj de la kunmetaĵo.

Tial la dismembriĝo de vortoj neniom embarasas lernanton; li eĉ ne konjektas ke tio kion li nomas finaĵo, aŭ afikso, estas tute memstara vorto, kiu ĉiam konservas saman signifon, uzata ĉu fine de unu vorto, ĉu komence de iu alia, ĉu memstare; ke ĉiu vorto samrajte povas esti uzata kiel radika vorto aŭ kiel gramatika parteto. Tamen rezulto de tiu ĉi strukturo de la lingvo estas tio, ke ĉion kion vi skribos en la internacia lingvo, tuj kaj plenprecize komprenos (kun la ŝlosilo aŭ eĉ sen ĝi) ĉiu, kiu ne nur ne ellernis anticipe gramatikon de la

lingvo, sed eĉ neniam aŭdis pri ĝia ekzisto. Mi klarigos tion per la ekzemplo:

Mi okazis en Rusio, sciante eĉ ne vorton ruse; mi devas rilati al iu, do mi skribas sur papereto per libera internacia lingvo ekzemple tion:

**Mi ne sci'as kie mi las'is la baston'o'n; ĉu vi ĝi'n ne vid'is?** Mi prezentas al la konversacianto internaci-rusan vortaron, kaj montras al li komencon de ĝi, kie per grandaj literoj estas skribita [ruse] jena frazo:

"Ĉion verkitan en la internacia lingvo eblas kompreni helpe de tiu ĉi vortaro.

Vortoj, prezentantaj kune unu nocion, estas skribataj kune, sed dividiĝas unu de la alia per streketoj; tiel, ekzemple, vorto **frat'in'o**, estas kunmetita el tri vortoj, ĉiun el kiuj oni devas serĉi aparte."

Se mia konversacianto neniam aŭdis pri internacia lingvo, do li, komence, mire elstreĉos la okulojn, sed li prenos mian papereton, serĉados per la indikita metodo en la vortaro, kaj trovos tion:

**(Mi ne sci'as kie mi las'is la baston'o'n; ĉu vi ĝi'n ne vid'is?):**

**Mi** mi я.....я  
**ne** ne не, нет.....не  
**sci'as**.....знаю

	<b>sci</b> знать	
	<b>as</b> наст. вр. глагола	
<b>kie</b>	<b>kie</b> где.....где	
<b>mi</b>	<b>mi</b> я.....я	
<b>las'is</b> .....	.....оставил	
	<b>las</b> оставлять	
	<b>is</b> прош. вр. глагола	
<b>la</b>	на русский не переводится	
<b>baston'o'n</b> .....	.....палку	
	<b>baston</b> палка	
	<b>o</b> сущ.	
	<b>n</b> винит. падеж	
<b>ĉu</b>	ли, разве.....ли	
<b>vi</b>	вы, ты.....вы	
<b>ĝi'n</b> .....	.....её	
	<b>ĝi</b> оно, это	
	<b>n</b> винит падеж	
<b>ne</b>	не, нет.....не	
<b>vid'is</b> .....	.....видели?	
	<b>vid</b> видеть	
	<b>is</b> прош. вр. глаг.	

Ĉi-maniere la ruso klare komprenos kion mi atendas de li.

Se li volos respondi al mi, mi montras al li vortaron rusan – internacian, komence de kiu estas presite [ruse] tio:

"Se vi deziras esprimi ion internaci-lingve, uzu



tiun ĉi vortaron, serĉante vortojn en la vortaro mem, kaj gramatikajn finaĵojn – en gramatika aldonaĵo, en rubriko de koncerna gramatika vortkласo".

Ĉar, kiel oni vidas en gramatika aldonaĵo de tiu ĉi lernilo, plena gramatiko de ĉiu vortkласo okupas ne pli ol kelkajn liniojn, trovo de finaĵo por esprimi koncernan gramatikan formon prenos ne pli da tempo ol trovo de vorto en la vortaro.

Mi rimarkigas la leganton pri la supre prezentita punkto, ŝajne simpla, sed havanta grandegan praktikan signifon. Estas superflue diri ke en ĉiu alia lingvo, se la kun-konversacianto ne konas ĝin, vi ne kapablos interkompreniĝi kun helpo eĉ de plej bona vortaro, ĉar por uzi vortaron de iu ajn el ekzistantaj lingvoj oni devas pli-malpli bone koni la lingvon.

Por trovi iun vorton oni devas koni ĝian komencon; sed en sencohava parolo ĉiu vorto estas, plej ofte, uzata en iu gramatika formo, ofte neniom simila al baza formo de la vorto, kaj estas kunigita kun diversaj prefiksoj, sufiksoj k.t.p. Tial, ne konante la lingvon, vi trovos en vortaro preskaŭ neniun. Kaj eĉ se vi trovos iom da vortoj, ili donos al vi neniun komprenon pri signifo de la frazo.

Se mi, ekzemple, skribus la menciitan frazon germane:

(Ich weiss nicht wo ich den Stock gelassen

habe; haben Sie ihn nicht gesehen?),

tiam persono kiu ne konas germanan lingvon trovos en vortaro tion:

Ich weiss nicht wo ich den

«Я белый нет где я (?)

«Mi blannk'a ne kie mi (?)

Stock gelassen habe;

палка, этаж транквил'а имущество;

baston'o, etaĝ'o транквил'а havaĵ'o;

haben Sie ihn nicht gesehen?

иметь она, они, вы (?) нет (?)

posedi ŝi, ili, vi (?) ne (?)

Mi jam ne parolas pri tio ke vortaro de ĉiu el ekzistantaj lingvoj estas ekstreme ampleksa, kaj ke serĉado eĉ de du aŭ tri vortoj en ĝi jam estas laboro laciga, dum vortaro internacia, pro la dismembriĝ-strukturo de la vortoj, estas ekstreme eta kaj oportuna; mi eĉ ne parolas pri tio ke en ĉiu lingvo ĉiu envortara vorto havas multajn signifojn, el kiuj oni devas divene elekti la taŭgan. Kaj eĉ se vi imagos al vi lingvon kun ideala, plej simpligita gramatiko, kun konstanta konkreta unusola signifo por ĉiu vorto, – ankaŭ tiam, por ke adresato kun helpo de vortaro komprenu vian skribaĵon, estas bezonate ke li ne nur ellernu antaŭe la gramatikon, sed ankaŭ akiru sufiĉe da kutimiĝo en ĝi, por libere

orientiĝi, distingi radikan vorton de vorto gramatike ŝanĝita, komplika, derivita. k.t.p.

T.e. utilo de la lingvo denove dependus de kvanto da ĝiaj adeptoj, kaj ĉe foresto da tiuj ĝi egalus al nulo. Ĉar sidante, ekzemple, en vagono, kaj dezirante demandi la najbaron «kiom longe ni staros en tiu ĉi stacio» vi ja ne proponos al li ellerni antaŭe gramatikon de la lingvo!

Tamen internaci-lingve vi povas esti tuj komprenata per ano de iu ajn nacio, ankaŭ se li ne nur ne posedas tiun ĉi lingvon, sed eĉ neniam aŭdis pri ĝi. Ĉiun libron, verkitan internaci-lingve, ĉiu povas libere legi kun vortaro en la mano sen iu ajn prepariĝo, kaj eĉ sen bezono legi antaŭe iun ajn antaŭparolon, klarigantan uzon de la **vortaro**<sup>3</sup>, kaj klera persono, kiel vi vidos poste, eĉ la vortaron uzos malofte.

Se vi deziras skribi, ekzemple, al iu hispano en Madridon, sed nek vi konas lian lingvon, nek li – la vian, kaj se vi dubas, ĉu konas li la internacian lingvon, kaj eĉ ĉu aŭdis li pri ĝi, – vi, malgraŭ tio, povas kuraĝe skribi al li, estante certa ke li vin komprenos! .

Dank al vort-divideca strukturo de la internacia lingvo tuta vortaro, bezonata por ĉiutaga vivo, okupas, kiel videblas en la aldonita ekzemplero, ne pli ol duonfoliegon. Ĝi estas oportune metebla en

---

**3.** Ĉar al tiu ĉi broŝuro estas aldonita vortaro kun parol-ekzemploj, la leganto povas tuj fari la provon.

plej malgrandan koverton, kaj per unu kopeko povas esti ricevita iu ajn lingve. Tial sufiĉas nur skribi la leteron internaci-lingve, enmeti en ĝin hispanan ekzempleron de la vortareto, kaj la adresato jam komprenos vin, ĉar tiu ĉi vortaro estas ne nur oportuna kaj plena ŝlosilo por la letero, sed ĝi mem klarigas sian celon kaj manieron de la apliko. Helpe de tiu ĉi vortareto, dank al plej vasta kunmetado de la vortoj, eblas esprimi ĉion bezonatan en ĉiutaga vivo. Sed, memkompreneble, en ĝi forestas vortoj malofte uzataj, vortoj teknikaj (kaj ankaŭ vortoj "alilandaj", kiuj estas konataj al ĉiu, ekz **tabak'o, teatr'o, fabrik'o** k.t.p.). Tial, se vi devas nepre uzi tiujn ĉi vortojn, kaj ne scipovas anstataŭigi ilin per aliaj vortoj aŭ frazoj, vi devos ekuzi plenan vortaron, kiun tamen ne estas bezonate sendi al la adresato: ĉe la menciitaj vortoj vi povas nur meti en krampoj tradukon de ili en lingvo de la adresato.

**b)** Do, danke al menciita jam strukturo de la lingvo, mi povas interkompreniĝi per ĝi kun kiu mi volas. Sola maloportuno (ĝis komuna ekuzado de la lingvo) estos nur tio, ke mi devos ĉiufoje atendi ĝis la konversacianto komprenos miajn pensojn.

Por forigi laŭeble ankaŭ tiun ĉi maloportunecon (almenaŭ dum rilatoj kun homoj kleraj) mi faris tion: la vortaron mi kompilis ne arbitre, sed, laŭeble, el vortoj konataj al tuta klera mondo.

Tiel, ekzemple, vortojn same uzatajn en ĉiuj

civilizitaj lingvoj (tiel nomatajn "alilandajn" aŭ "teknikajn"), mi lasis sen iu ajn ŝanĝo. El vortoj malsame sonantaj en diversaj lingvoj mi prenis tiujn kiuj estas komunaj al du – tri plej gravaj eŭropaj lingvoj, aŭ vortojn apartenantajn nur al unu lingvo, sed popularajn ankaŭ ĉe aliaj popoloj.

Kie koncerna vorto en ĉiu lingvo sonas alie, mi penis trovi vorton kiu havus nur taŭgan signifon aŭ malpli oftan uzon, estante tamen konata al plej gravaj popoloj (ekz. vorto **близкий** **proksim'a** en ĉiu lingvo sonas alie. Sed sufiĉas preni latinan **ближайший** (**proximus**), kaj okazos ke ĝi, diverse ŝanĝita, estas uzata en ĉiuj plej gravaj lingvoj. Sekve se vorton **близкий** mi nomu **proksim**, mi estos pli-malpli komprenata al ĉiu klera homo); En aliaj okazoj mi penis kutime el la latina, estiel lingvo duon-internacia (mi detenis min de tiuj reguloj nur tie kie tion postulis apartaj cirkonstancoj, ekzemple evito de homonimoj, simpleco de la ortografio k.t.p.) Tial dum korespondado kun mezklera eŭropano, neniom lerninta la internacian lingvon, mi povas esti certa ke li ne nur komprenos min, sed eĉ sen ofta bezono serĉadi en vortaro, kiun li uzos nur ĉe dubaj vortoj.

Klariginte esencon de mia lingvo, mi donas kelkajn ekzemplojn de la internacia parolo, por ke leganto povu kontroli ĉion diritan supre:

# 1. Patr'o nia

Patr'o nia, kiu est'as en la ĉiel'o, sankt'a est'u Via nom'o, ven'u reĝ'ec'o Vi'a, est'u vol'o Vi'a, kiel en la ĉiel'o, tiel ankaŭ sur la ter'o. Pan'o'n nia'n ĉiu'tag'a'n don'u al ni hodiaŭ kaj pardon'u al ni ŝuld'o'j'n ni'a'j'n kiel ni ankaŭ pardon'as al ni'a'j ŝuld'ant'o'j; ne konduk'u ni'n en tent'o'n, sed liber'ig'u nin de la mal'ver'a, ĉar Vi'a est'as la reg'ad'o, la fort'o kaj la glor'o etern'e. Amen!

# 2. El la Bibli'o

Je la komenc'o Di'o kre'is la ter'o'n kaj la ĉiel'o'n. Kaj la ter'o est'is sen'form'a kaj dezert'a, kaj mal'lum'o est'is super la profund'aĵ'o, kaj la anim'o de Di'o si'n port'is super la akv'o. Kaj Di'o dir'is: est'u lum'o; kaj far'iĝ'is lum'o. Kaj Di'o vid'is la lum'o'n, ke ĝi est'as bon'a, kaj nom'is Di'o la lum'o'n tag'o, kaj la mal'lum'o'n Li nom'is nokt'o. Kaj est'is vesper'o, kaj est'is maten'o – unu tag'o. Kaj Di'o dir'is: est'u firm'aĵ'o inter la akv'o, kaj ĝi apart'ig'u akv'o'n de akv'o. Kaj Dio kre'is la firm'aĵ'o'n kaj apart'ig'is la akv'o'n kiu est'as sub la firmaĵ'o de la akv'o kiu est'as super la firmaĵ'o. Kaj far'iĝ'is tiel. Kaj Dio nom'is la firmaĵ'on ĉiel'o. Kaj est'is vesper'o, kaj est'is maten'o – la du'a tag'o. Kaj Di'o dir'is: kolekt'u sin la akv'o de sub la ĉiel'o unu lok'o'n, kaj montr'u sin sek'aĵ'o; kaj far'iĝ'is tiel. Kaj Di'o nom'is la sek'aĵ'o'n ter'o, kaj la kolekt'o'j'n de la akv'o Li nom'is mar'o'j.

### 3. Letero

Kar'a amik'o!

Mi prezent'as al mi kia'n vizaĝ'on vi far'os post la ricev'o de mi'a leter'o. Vi rigard'os la sub'skrib'o'n kaj ek'kri'os: “ĉu li perd'is la saĝ'on?! Je ki'a lingv'o li skrib'is? Kion signif'as la foli'et'o, kiu'n li al'don'is al si'a leter'o?” Trankvil'iĝ'u, mi'a kar'a! Mi'a saĝ'o, kiel mi almenaŭ kred'as, est'as tut'e en ord'o.

Mi leg'is antaŭ kelk'a'j tag'oj libr'et'o'n sub la nom'o “Lingv'o inter'naci'a”. La aŭtor'o kred'ig'as, ke per tiu lingv'o oni pov'as est'i kompren'at'a de la tut'a mond'o, se eĉ la adres'it'o ne sol'e ne sci'as la lingv'o'n, sed eĉ ankaŭ ne aŭd'is pri ĝi; oni dev'as sol'e al'don'i al la leter'o mal'grand'a'n foli'et'o'n nom'at'a'n “vort'ar'o”. Dezir'ant'e vid'i ĉu tio est'as ver'a mi skrib'as al vi en tiu lingv'o, kaj mi eĉ unu vort'o'n ne al'met'as en ali'a lingv'o, tiel kiel se ni tut'e ne kompren'us unu la lingv'o'n de la ali'a. Respond'u al mi, ĉu vi efektiv'e kompren'is kion mi skrib'is. Se la afer'o propon'it'a de la aŭtor'o est'as efektiv'e bon'a, oni dev'as per ĉiu'j fort'o'j lin help'i. **Kian**<sup>4</sup> mi hav'os vi'a'n respond'o'n, mi send'os al vi la libr'et'o'n; montr'u ĝi'n al ĉiu'j loĝ'ant'o'j de vi'a urbet'o, send'u ĝi'n ĉiu'n vilaĝ'o'n ĉirkaŭ la urb'et'o, ĉiu'n urb'o'n kaj urbet'o'n, kie vi nur hav'as amik'o'j'n aŭ kon'it'o'j'n. Est'as neces'e ke grand'eg'a nombr'o da person'o'j don'u si'a'n voĉ'o'n – tia'n post la plej mal'long'a temp'o est'os decid'it'a afer'o, kiu pov'as port'i grand'eg'a'n util'o'n al la hom'a soci'et'o.

---

4. «kian»; poste: «kiam». (de la tradukinto)

## 4. Mia penso

Sur la kamp'o, for de l'mond'o,  
Antaŭ nokt'o de somer'o  
Amik'in'o en la rond'o  
Kant'as kant'o'n pri l'esper'o.

Kaj pri viv'o detru'it'a  
Ŝi rakont'as kompat'ant'e, –  
Mi'a vund'o re'frap'it'a  
Mi'n dolor'as re'sang'ant'e.

"Ĉu vi dorm'as? Ho, sinjor'o,  
Kial tia sen'mov'ec'o?  
Ha, kred'abl'e re'memor'o  
el la kar'a infan'ec'o?"

Kio'n dir'i? Ne plor'ant'a  
Pov'is est'i parol'ad'o  
Kun fraŭl'in'o ripoz'ant'a  
Post somer'a promen'ad'o!

Mi'a pens'o kaj turment'o,  
Kaj dolor'o'j kaj esper'o'j!  
Kiom de mi en silent'o  
Al vi ir'is jam ofer'o'j!

Kio'n hav'is mi plej kar'a'n –  
La jun'ec'o'n – mi plor'ant'a  
Met'is mem sur la altar'o'n  
De la dev'o ordon'ant'a!

Fajr'o'n sent'as mi intern'e,  
Viv'i ankaŭ mi dezir'as, –  
lo pel'as mi'n etern'e,  
Se mi al gaj'ul'o'j ir'as...



Se ne plaĉ'as al la sort'o  
Mi'a pen'o kaj labor'o –  
Ven'u tuj al mi la mort'o,  
En esper'o – sen dolor'o

## 5. El Heine

En song'o princ'in'o'n mi vid'is  
Kun vang'o'j mal'sek'a'j de plor'o –  
Sub arb'o, sub verd'a ni sid'is  
Ten'ant'e sin kor'o ĉe kor'o.

"De l'patr'o de l'vi'a la kron'o  
Por mi ĝi ne est'as hav'ind'a!  
For, for lia scep'tr'o kaj tron'o –  
Vin mem mi dezir'as, am'ind'a!"

– "Ne ebl'e!" ŝi al mi re'dir'as:  
"En tomb'o mi est'as ten'at'a,  
Mi nur en la nokt'o el'ir'as  
Al vi, mia sol'e am'at'a!"

## 6. Ho, mia kor`

Ho, mi'a kor`, ne bat'u mal'trankvil'e,  
El mi'a Brust'o nun ne salt'u for!  
Jam ten'i min ne pov'as mi facil'e  
Ho, mi'a kor`!

Ho mi'a kor`! Post long'a labor'ad'o  
Ĉu mi ne venk'os en decid'a hor`!  
Sufiĉ'e! trankvil'ig'u de l'bat'ad'o,  
Ho, mi'a kor`!

Mi finis analizi ĉefajn ecojn de mia lingvo; mi montris kiujn oportunaĵojn ĝi prezentas al ĉiu ellerninta ĝin, mi pruvis ke sukceso de ĝi neniom dependas de rilato de komunumo al ĝi, ke ĝi vere rajtas nomiĝi internacia lingvo, eĉ se neniu en mondo eĉ aŭdi pri ĝi ne volus; ke al ĉiu ellerninta ĝin ĝi vere donas eblecon interkompreniĝi kun personoj de iu ajn nacio, kondiĉe ke tiu persono estu klera.

Sed mia lingvo havas ankaŭ alian celon: ne kontentiĝante per sia internacieco ĝi devas iĝi ankaŭ tutmonda, t.e. atingi tion, ke plimulto da klera mondo povu libere paroli ĝin.

Kalkuli je subteno de komunumo en atingo de tiu ĉi celo, signifus konstrui sur plej ŝancela fantasma grundo, ĉar grandega plimulto da komunumo ŝatas subteni nenion, kaj volas ke ĉion oni prezentu al ĝi preta. Tial mi penis trovi rimedojn atingi la celon sendepende de subteno de komunumo. Unu el la rimedoj, kiun mi klarigos pli detale, estas io simila al tutmonda voĉdonado.

Se ĉiu el la legantoj bone pripensus tion kio estis prezentita antaŭe, do ĉiu devus veni al konkludo, ke kono de la internacia lingvo estas por li senkondiĉe profita, kaj pli ol sufiĉe pripagas ne-grandan laboron de ĝia ellerno; sekve mi povus atendi ke jam de komenco mem la lingvo estos akceptita per amaso da homoj.

Sed dezirante esti preta prefere al tre malavantagaj cirkonstancoj, ol esti allogata per tro roza espero, mi supozas ke tiaj homoj, komence, estos ekstreme malmultaj, ke tre malmultaj trovos en mia lingvo sufiĉan profiton por si, kaj por la principo neniu oferos eĉ horeton; ke grandega plimulto da miaj legantoj aŭ tute lasos la aferon senatente aŭ, dubante, ĉu plene rekompencita estos ilia laboro, ili ne kuraĝos ekposedi mian lingvon pro timo ke iu, eble, nomos ilin revantoj (nomo kiun plimulto da homoj, nuntempe, ĝenas pli ol ion alian). Sed kio estas postulata por igi tiun grandegan amason da indiferentuloj kaj nedecidemuloj ekokupiĝi pri ellerno de la internacia lingvo?

Se ni enrigardos, figur-dire, animon de ĉiu el tiuj ĉi indiferentuloj, ni ekscios jenon: neniu havas ion kontraŭ ekuzo de internacia lingvo. Inverse, ĉiu estus tre ĝoja al tio; sed li volus ke sen plej eta peno aŭ ofero de lia flanko, tuj, en unu bela mateno okazos ke plimulto da klera mondo posedas jam tiun ĉi lingvon. Tiam, certe, persono eĉ plej indiferenta, hastus ellerni la lingvon, ĉar malŝpari tiam mizeran laboron por ellerno de lingvo, posedanta supre prezentitajn ecojn, kaj kiun, krom tio, posedas jam plimulto da klera mondo, estus jam ekstreme stulte.

Por doni al komunumo ĉion pretan, postulante eĉ ne plej etan pioniradon de ies flanko; por ke sen plej eta peno aŭ ofero de ies flanko, en unu bela

mateno okazu ke plimulto da klera mondo ellernis jam aŭ publike promesis ellerni la internacian lingvon, mi faras tion:

Tiu ĉi broŝuro estas dissendata tutmonden. Postulante nek ellernon de la lingvo, nek ion alian, kio kostus laboron, tempon aŭ monon, mi petas ĉiun leganton preni por unu minuto la plumon, plenigi iun el aldonitaj sube formularoj, kaj sendi ĝin al mi.

Jen enhavo de la formularo:

"Mi, subskribinta, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se okazos ke dek miliono da personoj donis publike saman promeson." Sekvas subskribo kaj **stampo**<sup>5</sup>.

Sur alia flanko de la formularo oni klare enskribusian plenan nomon kaj precizan adreson.

Kiu havas ion principan kontraŭ la internacia lingvo, alsendu la formularon kun forstrekita teksto kaj kun surskribo "**kontraŭ**". Sed, aliflanke, kiuj volos ellerni la lingvon senkondiĉe, sendepende de kvanto da alsenditaj promesoj, forstreku duan parton de la teksto, kaj anstataŭigu ĝin per alskribo "**sen'kondiĉe**".

Subskribo de la promeso postulas neniun oferon aŭ laboron kaj, se la afero fiaskos, devigas al nenio. Ĝi devigas ellerni la lingvon okaze ke dek

---

**5.** Personoj, ne havantaj propran stampon, povas anstataŭigi ĝin per stampo de iu alia persono, kiu ĉi-okaze garantias aŭtentikecon de la subskribo.

milionoj da aliaj legoscias personoj ellernos ĝin. Sed tiam, evidente, tio estos jam ne ofero de flanko de la subskribinto, sed afero kiun li ankaŭ sen iu ajn promeso rapidus komenci. Tamen ĉiu subskribinta la formularon, nenion oferante persone, plirapidigos efektivigon de la tradicia idealo de homaro.

Kiam kvanto da alsenditaj subskriboj venos ĝis dek milionoj, tiam ĉiuj tiuj nomoj kaj adresoj estos publikitaj en aparta libro, kaj sekvontmatene, post apero de tiu ĉi libro, evidentiĝos ke dek milionoj da homoj promesis unu al alia ellerni la internacian lingvon, kaj la problemo estos solvita.

Kolekti subskribojn oni povas por iu ajn afero, sed troviĝas malmultaj dezirantoj doni sian subskribon eĉ se la afero estus plej nobla kaj utila al ĉiuj. Sed se tiu ĉi subskribo, helpante al efektivigo de nobla idealo postulas de la subskribanto tute neniun materian aŭ moralan oferon, tute neniujn penojn, tiam ni havas plenan rajton esperi ke neniu rifuzos doni sian subskribon, ĉar ĉi-okaze la rifuzo estus jam ne profitemo, sed krimo, ne malzorga rilato al la komuna afero, sed intenca kontraŭago. Rifuzo en tiuj ĉi okazoj povus esti klarigita nur per timo de iuj aristokratoj de sango, scienco aŭ mono, ke ties nomo okazos apud nomo de persono malpli privilegia. Sed mi permesas al mi esperi ke troviĝos malmultaj personoj kiuj pro tiu ĉi vana orgojlo decidus bremsi la gravan

tuthomaran aferon.

Estas sendube ke neniu povas havi ion kontraŭ enkonduko de internacia lingvo. Sed se iu malaprobas la internacian lingvon en tiu formo kiu estas proponata de mi, tiu, anstataŭ jam menciita promeso, alsendu proteston, sed reagi al tiu ĉi afero estas devo de ĉiu legoscia persono de ĉiu aĝo, sekso kaj rango, des pli ke tiu ĉi voĉdonado postulas nur kelkajn minutojn por plenigo de la preta formularo, kaj kelkajn moneretojn da poŝtaj elspezoj.

Personoj, nomoj de kiuj forestos en libro de la voĉdonado, kiel en parto de promesantoj tiel en parto de kontraŭantoj, restos poste senpravigitaj antaŭ komunumo. Neniu esperu pravigi sin per tio ke li "ne aŭdis" pri la proponita voĉdonado, ĉar estos entreprenita ĉio por ke ĉiu sciu pri ĝi. Redakciojn de ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj mi petas transdoni enhavon de la alvoko; ĉiun apartan personon mi petas informi mian proponon al siaj amikoj kaj konatoj.

— • —

Jen estas ĉio kion mi trovis necesa diri pri mia afero. Mi estas malproksima de opinio ke lingvo proponita de mi estas io perfekta, ke nenio jam povas esti pli alta kaj bona; sed mi penis, kiom mi povis, kontentigi ĉiujn postulojn, kiujn oni povas meti antaŭ lingvo internacia.

Elpaŝi antaŭ publiko mi decidis nur kiam mi

sukcesis solvi ĉiujn problemojn, starantajn antaŭ mi (pro malgrandeco de la broŝuro mi preparolis ĉi tie nur plej gravajn el ili), kaj nur post multjara pripenso de la afero. Sed mi estas homo, kaj povis erari, povis fari iun nepardoneblan maltrafon, povis lasi la lingvon sen io kio estus tre utila por ĝi. Tial, antaŭ ol eldoni plenajn vortarojn kaj komenci eldonadon de ĵurnaloj, gazetoj, libroj k.t.p, mi prezentas mian aferon al publiko por unujara pridiskuto, kaj turnas min al tuta klera mondo kun peto prezenti al mi sian opinion pri la lingvo proponita de mi. Ĉiu informu min skribe pri tio kion li trovas necesa ŝanĝi, plibonigi, aldoni k.t.p.

El senditaj al mi proponoj mi danke uzos ĉiujn el ili kiuj okazos vere kaj sendube utilaj sen rompi bazajn ecojn de la lingvo, t.e. simplecon de ĝia ellerno kaj senduban taŭgecon de ĝi por internaciaj rilatoj sendepende de kvanto da subtenantoj. Post tiuj eblaj ŝanĝoj, kiuj estos ĉi-okaze publikitaj en aparta broŝuro, estos fiksita definitiva, konstanta formo de la lingvo.

Se tiuj korektoj ŝajnos al iu nesufiĉaj, tiu ne devas forgesi ke ankaŭ poste la lingvo ne estos fermata por diversaj plibonigoj, kun tiu nur diferenco, ke rajton ŝanĝi apartenos tiam jam ne al mi, sed al aŭtoritata, agnoskita per ĉiuj akademio de tiu ĉi lingvo.

Estas malfacile krei internacian lingvon kaj atingi enkondukon de ĝi; jen kial oni devas turni nun la cefan atenton al tio. Sed kiam la lingvo jam

enradikiĝos, ekestos vaste uzata, tiam konstanta aŭtoritata akademio povas, laŭbezone, facile, poiome kaj nerimarke enigi plej diversajn plibonigojn, eĉ se por tio estos bezonate ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonleco. Tial mi permesas al mi peti la legantojn, kiuj estus ial nekontentaj per mia lingvo, sendi protestojn anstataŭ promesoj nur en okazo ke ili havas por tio kaŭzojn seriozajn, se ili trovis en la lingvo flankojn malutilajn, poste neŝanĝeblajn.

La laboron, kiu kostis al mi multe da tempo kaj sano, mi prezentas nun al bonvola atento de komunumo. Mi esperas ke ĉiu, al kiu karas komunhomaj interesoj, donos al mi manon de la helpo, kaj kiom eble, laŭ siaj eblecoj, subtenos la aferon proponitan de mi. Cirkonstancoj montros al ĉiu per kio li povas esti utila al la afero; mi nur permesas al mi rimarkigi amikojn de la internacia lingvo pri tio, ke plej grava afero sur kiu devas esti turnata nun nia atento, estas sukceso de la voĉdonado.

Ĉiu faru kion li povas, kaj post plej mallonga tempo ni havos jam tion, pri kio homoj tiel delonge revas: komunhoman lingvon. La aŭtoro humile petas la leganton plenumi kaj sendi al li unu el aldonitaj sube formularoj, kaj aliajn disdoni samcele al la amikoj kaj konatuloj.



## Promes'o

Mi, sub'skrib'int'a, promes'as el'lern'i la propon'it'a'n de d-ro Esperanto lingv'o'n internaci'a'n, se okaz'os ke dek milion person'o'j don'is publik'e sam'a'n promes'o'n.

*Sub'skrib'o:*

Nom'o:

Adres'o

# Plena lernolibro de la lingvo internacia

## A) Aboco

**A a, B b, C c, Ĉ ĉ, D d, E e, F f, G g,**  
а б ц ч д е ф г

**Ĝ ĝ, H h, Ĥ ĥ, I i, J j, Ĵ ĵ, K k, L l,**  
дж (гх) х и й ж к л

**M m, N n, O o, P p, R r, S s, Ŝ ŝ, T t,**  
м н о п р с ш т

**U u, Ŭ ŭ, V v, Z z.**  
у у(краткое) в з

## B) Gramatikaj vortklasoj

**1.** Nedifina artikolo forestas; estas nur difina artikolo (**la**), sama por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj.

**2.** Substantivo ĉiam finiĝas per **o**. Por krei pluralon aldoniĝas finaĵo **j**.

Kazoj estas nur du: nominativo kaj akuzativo; tiu ĉi lasta kreiĝas el nominativo per aldono de finaĵo **n**. Aliaj kazoj esprimiĝas per prepozicioj (por genitivo – **de** (от), por dativo – **al** (к), por instrumentalo – **kun** (с) aŭ per aliaj prepozicioj koncerne al la senco).

(Ekzemploj: **patr'o** отец; **al patr'o** отцу; **patr'o'n** отца [akuzativo]; **por patr'o'j** для отцов; **patro'j'n** отцов [akuzativo]).

**3.** Adjektivo ĉiam finiĝas per **a**. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe substantivo.

Komparativo kreiĝas helpe de vorto **pli**, kaj superlativo – **plej** (наиболее); vorto **чем** переводится **ol**.

(Ekzemploj: **pli blank'a ol neĝ'o**

белее снега;

**mi hav'as la plej bon'a'n patrin'o'n**

я имею самую лучшую мать).

**4.** Numeraloj bazaj (ne estas deklinaciaj):

**unu** (1); **du**(2); **tri** (3); **kvar** (4); **kvin** (5); **ses** (6); **sep** (7); **ok** (8); **naŭ** (9); **dek** (10); **cent** (100); **mil** (1000). Dekoj kaj centoj kreiĝas per simpla kunmetado de la numeraloj.

Por kreo de la ordaj aldoniĝas finaĵo de adjektivo; por la multiplikaj – afikso **obl**, por la frakciaj – **on**, por la kolektivaj – **op**, por la distribuaj – **po**.

Krom tio povas esti numeraloj substantivaj kaj adverbaj (Ekzemploj: **kvin'cent tri'dek tri** = 533; **kvar'a четвёртый**; **unu'o единица**; **du'e во вторых**; **tri'obl'a тройной**; **kvar'on'o четверть**; **du'op'e – вдвоём**; **po kvin – по пяти**)

**5.** Pronomoj personaj: **mi** (я); **vi** (вы,ты); **li** (он); **ŝi** (она); **ĝi** (оно: pri aĵo aŭ besto); **si** (себя); **ni** (мы); **ili** (они); **oni** (безличное множественного числа); la posedaj kreiĝas per aldonado de finaĵo adjektiva.

Deklinacio kiel ĉe substantivoj ( Ekzemploj: **mi'n** меня [винит.]; **mi'a** мой).

**6.** Verbo ne ŝanĝiĝas laŭ personoj kaj nombroj

(Ekzemple: **mi far'as** я делаю; **la patr'o far'as** отец делает; **ili faras** они делают).

a) Prezenco ricevas finaĵon **as** (ekzemple: **mi far'as** я делаю).

b) Preterito – **is** (**li far'is** он делал).

c) futuro – **os** (**ili far'os** они будут делать).

ĉ) kondicionala modo – **us** (**ŝi far'us** она бы делала).

d) imperativo – **u** (**far'u** делай, делайте).

e) infinitivo – **i** (**far'i** делать).

### Participo (kaj gerundio)

f) De aktiva voĉo de nuno – **ant** (**far'ant'a** делающий <kiu plenumas la faron: konstruanta, pripensanta><sup>6</sup>, **far'ant'e** – делая).

g) De aktiva voĉo de paseo – **int** (**far'int'a** сделавший <kiu plenumis la faron: konstruinta, pripensinta>).

ĝ) De aktiva voĉo de futuro – **ont** (**far'ont'a** который сделает <kiu plenumos la faron: konstruonta, pripensonta>).

h) De pasiva voĉo de nuno – **at** (**far'at'a**

---

6. Ene de la angulaj krampoj <> la tradukinto ilustras la ruslingvajn ekzemplojn.

делаемый <kies faron oni plenumas: konstruata, pripensata>).

ĥ) De pasiva voĉo de paseo – **it** (far'it'a сделанный. <kies faron oni plenumis: konstruita, pripensita>).

i) De pasiva voĉo de futuro – **ot** (far'ot'a то что будет сделанным <kies faron oni plenumos: konstruota, pripensota>).

Ĉiuj formoj de pasiva voĉo kreiĝas per konforma formo de verbo **est** (быть) kaj participo **de nuno**<sup>7</sup> de pasiva voĉo de la verbo; ĉe tio estas uzata prepozicio **de**.

(Ekzemplo: **ŝi est'as am'at'a de ĉiu'j** она любима всеми).

**7.** Adverboj finiĝas per **e**. Gradoj de komparado kiel ĉe adjektivoj

(Ekzemplo: **mi'a frat'o pli bon'e kant'as ol mi** мой брат лучше меня поёт).

**8.** Ĉiuj prepozicioj postulas nominativon.

## C) Komunaj reguloj

**1.**(9) Ĉiu vorto estas legata tiel kiel ĝi estas

---

**7.** Tiu du vortj, poste, estas eliminataj.

skribata.

**2.**(10) Akcento ĉiam troviĝas sur antaŭlasta silabo.

**3.**(11) Vortoj kreiĝas per simpla kunmetado de la vortoj (plej grava – fine), kiuj estas skribataj kune, sed dividiĝas unu de la alia per streketo.

Gramatikaj finaĵoj ankaŭ estas rigardataj kiel memstaraj vortoj.

(Ekzemplo: **vapor'**ŝip'o парoход – el: **vapor** пар, **ŝip** корабль, **o** finaĵo de substantivo).

**4.**(12) Ĉe alia nea vorto vorto **ne** estas forlasata

(Ekzemplo: **mi nenian vidis** я никогда не видал).

**5.**(13) Ĉe demando **kie'n** vortoj akceptas finaĵon de akuzativo.

(Ekzemploj: **tie там** – **tie'n туда**; **Varsovi'o'n в Варшаву**).

**6.**(14) Ĉiu prepozicio havas konkretan konstantan signifon; sed se estas bezonate uzi prepozici-

cion, kaj rekta senco ne montras kiun ĝuste, tiam estas uzata prepozicio **je** kiu ne havas memstaran signifon.

(Ekzemploj: **ĝoj'i je tio**

**радоваться этому;**

**rid'i je tio**

**смеяться над этим;**

**enu'o je la patr'uj'o**

**тоска по родине** к.т.п.

Klareco ne perdiĝas pro tio, ĉar en ĉiuj lingvoj ĉi-okaze estas uzata iu ajn prepozicio, gravas nur ke kutimo donu al ĝi la sankcion; En internacia lingvo sankcio por ĉiuj similaj okazoj estas donita al unu prepozicio **je**.

Anstataŭ prepozicio **je** oni povas uzi ankaŭ akuzativon sen prepozicio.

**7.**(15) Tiel nomataj "alilandaj" vortoj, t.e. tiuj, kiujn plimulto da lingvoj prenis el unu malpropra fonto, estas uzataj en la internacia lingvo sen ŝanĝoj, ricevante nur internacian ortografion; sed ĉe diversaj vortoj de sama radiko preferindas uzi senŝanĝe nur bazan vorton, kaj aliajn krei konforme al reguloj de la internacia lingvo (Ekzemplo: **нация** – **naci'o**, sed **национальный** – **naci'a**).

**8.**(16) Finaĵoj de substantivo kaj de vorto **la** povas esti forlasataj kaj anstataŭigataj per apos-

trofo (Ekzemploj: **Ŝiller'** anstataŭ **Ŝiller'o**; **de l'mond'o** anstataŭ **de la mond'o**).

Tiu ĉi broŝuro, post nelonge, estos eldonita je lingvoj:

Germana, franca kaj pola.

Rajto traduki tiun ĉi broŝuron je ĉiujn aliajn lingvojn estas prezentata al ĉiu.

Adreso de la aŭtoro:

Al sinjoro D-ro L Zamenhof  
por D-ro Esperanto en Varsovio.

aŭ:

**Al sinjor'o D-r'o L. Zamenhof  
por D-r'o Esperanto en Varsovi'o.**



# Internacia – rusa vortaro

(Rusa parto de la vortaro estas eliminata ĉi tie per la tradukinto)

Tion kio estas skribita per internacia lingvo oni povas kompreni kun helpo de tiu ĉi vortaro. Vortoj, prezentantaj kune unu nocion, estas skribataj kune, sed dividiĝas unu de la alia per streketoj; tiel, ekzemple, vorto frat'in'o, estas kunmetita el tri vortoj, ĉiun el kiuj oni devas serĉi aparte.

(A)	aer	ant	bala
a	afer	antaŭ	balanc
означает	agl	apart	baldaŭ
прилагательное:	agrabl	aparten	ban
напр: <b>hom</b>	ajn	apenaŭ	bapt
человек, –	aĵ	apud	bar
<b>hom'a</b>	akompan	ar	barb
человеческий	akr	arb	barel
<b>acid</b>	akv	arĝent	baston
кислый	al	as	bat
<b>aĉet</b>	ali	at	batal
купить	almenaŭ	atend	bedaŭr
<b>ad</b>	alt	aŭ	bel
означает...	alumet	aŭd	ben
<b>A</b>	am	aŭskult	benk
a	amas	aŭtun	best
acid	amik	av	bezon
aĉet	an	avar	bier
ad	angul	azen	bind
adiaŭ	anĝel	<b>B</b>	bird
	ankaŭ	babil	blank
	ankoraŭ	bak	blov
	anstataŭ		blu

bo  
boj  
bol  
bon  
bord  
bot  
botel  
bov  
branĉ  
brand  
bril  
bros  
bru  
brul  
brust  
buŝ  
buter  
buton

## C

cel  
cent  
cert  
ceter  
cigar  
cigared  
citron

## Ĉ

ĉagren  
ĉambr  
ĉap  
ĉapel  
ĉar

ĉe  
ĉemiz  
ĉen  
ĉeriz  
ĉerk  
ĉes  
ĉeval  
ĉi  
ĉian (ĉiam!)  
ĉie  
ĉiel  
ĉio  
ĉirkaŭ  
ĉiu  
ĉj  
ĉu

## D

da  
danc  
danĝer  
dank  
daŭr  
de  
decid  
defend  
dek  
dekstr  
demand  
dens  
dent  
detru  
dev  
dezert  
dezir

Di  
dik  
diligent  
dimanĉ  
dir  
dis  
disput  
divid  
dolĉ  
dolor  
dom  
don  
donac  
dorm  
dors  
du  
dum

## E

e  
eben  
ebl  
ec  
eĉ  
eduk  
edz  
efektiv  
eg  
egal  
ej  
ek  
eks  
ekster  
ekzempl

el  
elekt  
em  
en  
enu  
envi  
er  
erar  
escept  
esper  
esprim  
est  
estim  
esting  
estr  
et  
etaĝ  
etern

## F

facil  
faden  
fajf  
fajr  
fal  
fald  
famili  
far  
fart  
feliĉ  
fend  
fenestr  
fer  
ferm  
fest

fianĉ	fromaĝ	griz	hor
fidel	frost	gust	horloĝ
fier	frot	gut	hotel
fil	fru	<b>Ĝ</b>	humil
fin	frukt	ĝarden	hund
fingr	frunt	ĝem	<b>I</b>
firm	fulm	ĝentil	i
fiŝ	fum	ĝi	ia
flank	fund	ĝis	ial
flar	<b>G</b>	ĝoj	<b>ian (iam!)</b> <sup>8</sup>
flav	gaj	<b>H</b>	id
flor	gajn	ha!	ie
flu	gant	hajl	iel
flug	gard	haladz	ies
fluid	gast	halt	ig
foj	ge	har	iĝ
fojn	genu	haring	il
foli	glaci	haŭt	ili
fond	glas	hav	in
font	glat	hejt	ind
for	glav	help	infan
forĝes	glit	herb	ing
forĝ	glor	hered	ink
fork	glut	hieraŭ	instru
forn	gorĝ	ho!	insul
fort	grand	hodiaŭ	insult
fos	gras	hom	int
frap	grat	honest	intenc
frat	gratul	hont	inter
fraŭl	grav		intern
freŝ			

**8 De la tradukinto:** Iom poste (en "Aldono al «Dua Libro de l' Lingvo Internacia»") Zamenhof ŝanĝis: **ian, ĉian, kian, nen-ian, tian je: iam, ĉiam, kiam, neniam, tiam.**

invit  
io  
iom  
ir  
is  
ist  
it  
iu

## I

j  
ja  
jam  
jar  
je  
jen  
jes  
ju – des  
juĝ  
jun  
just

## J

ĵaŭd  
ĵet  
ĵur

## K

kaf  
kaj  
kajer  
kaldron  
kaleŝ  
kalkul

kamen  
kamp  
kanap  
kandel  
kant  
kap  
kapt  
kar  
karb  
kares  
kaŝ  
kat  
kaŭz  
ke  
kelk  
kest  
kia  
kial  
kian (kiam!)  
kie  
kiel  
kies  
kio  
kiom  
kis  
kiu  
klar  
knab  
kok  
kol  
koleg  
kolekt  
koler  
kolon  
kolor

komb  
komenc  
komerc  
kompat  
kompren  
kon  
kondiĉ  
konduk  
konfes  
konsent  
konserv  
konsil  
konsol  
konstant  
konstru  
kontent  
kontraŭ  
konven  
kor  
korn  
koron  
korp  
kort  
kost  
kovr  
kraĉ  
krajon  
kravat  
kre  
kred  
kresk  
kret  
kri  
kruc  
kudr

kuir  
kuler  
kulp  
kun  
kupr  
kur  
kurac  
kuraĝ  
kurten  
kusen  
kuŝ  
kutim  
kuz  
kvankam  
kvar  
kvin

## L

l'; la  
labor  
lac  
lakt  
lam  
lamp  
land  
lang  
lantern  
larĝ  
larm  
las  
last  
laŭ  
laŭd  
laŭt  
lav

lecion  
leg  
leĝ  
leon  
lern  
lert  
leter  
lev  
li  
liber  
libr  
lig  
lign  
lingv  
lip  
lit  
liter  
loĝ  
lok  
long  
lud  
lum  
lun  
lund

## M

maĉ  
magazen  
makul  
mal  
malgraŭ  
man  
manĝ  
mar  
mard

mastr  
maten  
matur  
mem  
memor  
merit  
merkred  
met  
mez  
mezur  
mi  
miks  
mil  
milit  
mir  
mizer  
moder  
modest  
mol  
mon  
monat  
mond  
mont  
montr  
mord  
morgaŭ  
mort  
moŝt  
mov  
mult  
mur  
murmur  
muŝ

## N

n  
naĝ  
najbar  
nask  
naŭ  
naz  
ne  
nebul  
neces  
neĝ  
nek – nek  
nenia  
nenian  
(neniam!)  
nenie  
neniel  
nenies  
nenio  
neniu  
nep  
nev  
ni  
nigr  
nj  
nobl  
nokt  
nom  
nombr  
nov  
nub  
nud  
nuks  
nun  
nur

nutr

## O

o  
obe  
objekt  
obl  
obstin  
odor  
ofend  
ofer  
oft  
ok  
okaz  
okul  
okup  
ol  
ole  
ombr  
ombrel  
on  
ond  
oni  
onkl  
ont  
op  
oportun  
or  
ord  
ordinar  
ordon  
orel  
os  
ost

ot  
ov  
**P**  
pac  
paf  
pag  
paĝ  
pajl  
pal  
palac  
palp  
palpebr  
pan  
pantalon  
paper  
pardon  
parenc  
parker  
parol  
part  
pas  
pastr  
paŝ  
patr  
pec  
pel  
pen  
pend  
pens  
pentr  
per  
perd  
permes  
pes

pet  
pez  
pi  
pied  
pik  
pilk  
pingl  
pir  
plac  
plaĉ  
plafon  
plank  
plej  
plen  
plend  
plezur  
pli  
plor  
plum  
pluv  
po  
polv  
pom  
pont  
popol  
por  
pord  
pork  
port  
post  
postul  
poŝ  
poŝt  
pot  
pov

prav  
preĝ  
prem  
pren  
prepar  
preskaŭ  
pret  
prezent  
pri  
printemp  
pro  
profund  
proksim  
promen  
promes  
propon  
propr  
prov  
prudent  
prunt  
pulv  
pulvor  
pun  
pup  
pur  
puŝ  
putr

**R**  
rad  
radi  
radik  
rakont  
ramp  
rand

rapid  
raz  
re  
reg  
regn  
regul  
reĝ  
rekt  
rekompenc  
renkont  
renvers  
respond  
rest  
ricev  
riĉ  
rid  
rigard  
ring  
ripet  
ripoz  
river  
romp  
rond  
rost  
roz  
ruĝ

**S**  
sabat  
sabl  
saĝ  
sak  
sal  
salt

salut  
sam  
san  
sang  
sankt  
sap  
sat  
sav  
sci  
se  
sed  
seĝ  
sek  
sem  
semajn  
sen  
senc  
send  
sent  
sep  
serĉ  
serpent  
serur  
serv  
ses  
sever  
si  
sid  
sigel  
sign  
signif  
silent  
simil  
simpl  
sinjor

skrib  
sku  
sobr  
societ  
soif  
sol  
somer  
son  
song  
sonor  
sort  
sovaĝ  
spec  
spegul  
spert  
spir  
sprit  
stal  
star  
stel  
stomak  
strat  
sub  
subit  
suĉ  
sufer  
sufiĉ  
suk  
suker  
sun  
sup  
super  
supr  
sur  
surd

surtut

## Ŝ

ŝajn  
ŝancel  
ŝanĝ  
ŝaŭm  
ŝel  
ŝerc  
ŝi  
ŝip  
ŝir  
ŝlos  
ŝmir  
ŝnur  
ŝpar  
ŝpruc  
ŝrank  
ŝtal  
ŝtel  
ŝtof  
ŝton  
ŝtop  
ŝtrump  
ŝtup  
ŝu  
ŝuld  
ŝut  
ŝvel  
ŝvit

## T

tabl

tabul  
tag  
tajlor  
tamen  
tapiŝ  
taŭg  
te  
tegment  
teler  
temp  
ten  
tent  
ter  
terur  
tia  
tial  
tian (tiam!)  
tie  
tiel  
tim  
tio  
tiom  
tir  
tiu  
tol  
tomb  
tond  
tondr  
tra  
traduk  
tranĉ  
trankvil  
trans  
tre  
trem

tren  
tri  
trink  
tro  
tromp  
trov  
tru  
tuj  
tuk  
tur  
turment  
turn  
tus  
tuŝ  
tut

## U

u  
uj  
ul

um  
ung  
unu  
urb  
urs  
us  
util  
uz

## V

vaks  
van  
vang  
vapor  
varm  
vast  
vaz  
vek  
velk  
ven

vend  
vendred  
venen  
venĝ  
venk  
vent  
ventr  
ver  
verd  
verk  
verm  
verŝ  
vesper  
vest  
veter  
vetur  
vi  
viand  
vid  
vilaĝ

vin  
vintr  
violon  
vir  
viŝ  
vitr  
viv  
vizaĝ  
voĉ  
voj  
vok  
vol  
vort  
vost  
vund

## Z

zorg